



Ĉu Nitobe-raporton por la Eŭropa Unio?

Alvoko de Detlev Blanke

Antaŭ la 1a de majo 2004 Eŭropa Unio (EU) konsistis el 15 landoj kun 11 lingvoj, kiuj laŭ jura direktivo estis ne nur oficialaj sed ankaŭ laboraj samrajtaj lingvoj. Almenaŭ teorie. Malgraŭ grandegaj fortostreĉoj de la monde plej grandaj tradukaj kaj interpretaj servoj (de EU) traduki kaj interpreti el/en kiom eble plej multaj(n) lingvoj(n), en la ĉiutaga praktiko de EU regis la Angla (kun kreskanta tendenco) kaj la Franca (kun malkreskanta tendenco). Por la Germana restis inter 1-3%, kaj eĉ malpli por la restaj 8 lingvoj.

Aliĝis 10 novaj landoj. Ĉu la Unio povas kiel ĝis nun daŭrigi kun 20 lingvoj? Ĉu oni ŝanĝos la lingvo-regulojn, kun la rezulto de ankoraŭ malpli da lingva egaleco?

Jam ekzistas ellaboritaj proponoj. Jam antaŭ la plivastiĝo de EU en internaj rondoj de ĝiaj instancoj kaj en soci-lingvistikaj publikaĵoj oni pli-malpli malkaŝe esprimis, ke ankaŭ jure la ĝisnuna lingva reĝimo ne plu estas konservebla kun 20 lingvoj, ne parolante pri la perspektivo, kiam aliĝos pliaj landoj kun siaj lingvoj. Do en la perspektivo eventuale kreskos la interna lingvo-politika konfliktpotencialo, kiu fakte ligiĝus al pli profundaj ekonomiaj kaj politikaj problemoj kaj ambicioj de la unuopaj membro-ŝtatoj.

Diversaj esperantistaj lobiaj grupoj, ekz. Eŭropa Esperanto-Unio, la Studgrupo pri komunikado kaj lingvaj problemoj de EU, la Brusela Komunikad-Centro de UEA kaj diversaj aliaj grupiĝoj kaj individuoj tra la jaroj proponas Esperanton kiel interkomunikilon por Eŭropo, foje kun propono de eksperimentoj (kiujn neniu pretas realigi kaj financi), ĝenerale kun la kutimaj argumentoj. Flanke de la EU-koncernitoj ripetiĝas la argumentoj, ke en EU oni preferas la „vivajn“ naciajn lingvojn por konservi la multlingvismon kaj ne povas sin engaĝi por „morta“ lingvo, kiu cetere ne havas kulturon k.s. Tio montras ĝeneralan nekonon de bazaj faktoj pri Esperanto kaj pri ĝia ebla rolo protekti ĝuste la multlingvismon (kiel tia modelo funkcias, estus alia temo).

(Daŭrigo sur p. 13)

Junaj esperantologoj prelegu en Vilno

Estas fakto, ke jen kaj jen aperas junaj talentaj esperantistoj kun universitata klero, eĉ kun doktoreco, kiuj verkis interesajn esperantologiajn studojn, prezentis magistrigajn aŭ doktorigajn disertaciojn aŭ intencas tion fari, kaj tamen restas relative nekonataj. La bedaŭrinde nesufiĉa intereso en la movado por tia scienca agado ofte sekvigas certan frustron aŭ eĉ malaperon de tiuj talentuloj. Sed ni bezonas ĉiun talentulon, ne nur en la sferoj de faka apliko, beletro ktp., sed ankaŭ aparte en la sferoj de interlingvistiko kaj esperantologio. Ja restas ankoraŭ multo por esplori pri internacia lingva

komunikado, pri planlingvoj kaj - aparte - pri Esperanto kun ĝia komunumo, por havi pli bonan science bazitan fundamenton por niaj klopodoj kaj argumentoj. Pro tio la tradicia esperantologia konferenco, okazonta kadre de la Universala Kongreso 2005 en Vilno, ĉi-foje ne rilatiĝos al iu konkreta temo, sed estu loko aparte por junaj esperantologoj. Ili prezentu siajn studo-finajn disertaciojn, diskutigu siajn aperintajn aŭ aperontajn verkojn aŭ informu pri temoj, pri kiuj ili estas laborantaj aŭ pri scienc-organizaj aspektoj de sia esperantologia agado.

(Daŭrigo sur p. 14)

Schüler fordern:

Esperanto als zweite Fremdsprache

(red) Die Hannoversche Allgemeine Zeitung berichtete in ihrer wöchentlichen Rubrik ZiSH (Zeitung in der Schule) am 8. November über ein Projekt, in dem sich vier Schülersprecher zu ihrer Wunschvorstellung der Schule von morgen äußerten. Danach sollen die Schüler im Alter zwischen 6 und 10 Jahren Englisch als erste, danach aber Esperanto als allgemeine zweite Fremdsprache lernen, „dem sich hoffentlich viele andere Länder anschließen, so dass sich die Schüler überall verständlich machen können.“ - Natürlich lösten diese Vorschläge eine kontroverse Debatte aus.

<<http://www.haz.de/zish>>

Auf einen Blick

Esperanto-Stiftungen in Deutschland

Seiten 4-5

Neue Mitarbeiterin für den D.E.B.

Seite 10

Internacia Esperanto-Simpozio en Vieno

Seite 11

Botschafterin für den IS-Fonds

Seite 20



Der Vorstand des D.E.B. teilt mit

Neue Mitarbeiterin für den D.E.B.

Die Ungarin **Zsófia Kóródy**, die manchen von Ihnen bereits von den Seminaren in Herzberg am Harz bekannt sein dürfte, konnte dafür gewonnen werden, eine freiberufliche Tätigkeit für den Deutschen Esperanto-Bund (D.E.B.) aufzunehmen. Entsprechend ihren persönlichen Stärken in den Bereichen Organisation, Koordination und Unterricht kümmert sie sich seit September insbesondere um folgende Aufgaben:

- Betreuung von Ehrenamtlichen. Unter anderem wird sie das Vorhaben „Mentoren für Neumitglieder“, das bislang am Fehlen eines Koordinators gescheitert ist, in die Tat umsetzen.
- Koordination und Unterstützung des Esperanto-Unterrichts in Deutschland
- Unterstützung der Mitgliederverwaltung und -betreuung
- Mitarbeit bei der Vorbereitung des Jubiläumskongresses in Braunschweig 2006 (was sich auch im Hinblick auf die räumliche Nähe zu Herzberg anbietet)

Außerdem wird sie ihr Engagement bei den Herzberger Seminaren fortführen und intensivieren. Da Frau Kóródy eine kompetente Person mit umfangreicher Erfahrung in den genannten Bereichen ist und man sich auf ein sehr moderates Honorar geeinigt hat, konnte der Vorstand das Angebot nicht ausschlagen, obwohl auch eine Summe von ca. 4.000 Euro jährlich nicht aus den laufenden Einnahmen aufgebracht werden kann. Wir hoffen deshalb auf Ihre Spenden. Je mehr Spenden Sie geben, desto länger reichen unsere Rücklagen und desto länger kann Frau Kóródy für uns tätig sein.

(Das Spendenkonto ist im Impressum auf S. 18 oben angegeben.)

Esperanto und die Bibel

(red) Unter dieser Überschrift brachte die Zeitschrift Bibelreport in ihrer Ausgabe 3/2004 einen zweiseitigen, reich illustrierten Bericht von Gerrit Berveling. Der Autor hat 2002 erstmalig eine Esperanto-Übersetzung von Texten vorgelegt, die nicht in allen Bibeln enthalten sind, so die Bücher Tobit, Judit, Weisheit u.a.

Im Fernsehen?

Der rbb brachte in der deutsch-polnischen Sendereihe „Kowalski-Schmidt“ einen ausführlichen Beitrag über Esperanto, eine seriöse und wohlwollende Sendung. Die angekündigte Sendung „Außenseiter-Spitzenreiter“ des mdr wurde zwar nicht im Oktober gesendet; das Echo in der Redaktion war überraschend so gross, dass man sich zu einem größeren Beitrag, wohl Anfang 2005 (so die Redaktion), entschlossen hat.

Aus „Verda Informilo“ 11/2004

Interaktiver Kalender

Sie planen ein Esperanto-Treffen? Haben Sie es schon in „aliaflanko.de“ veröffentlicht? - Und wie macht man das? - Ganz einfach:

Man ruft www.aliaflanko.de im Internet auf. Dort findet man auch die Maske, in die man selber seine Veranstaltung eintragen kannst. Ebenso kann man dort selber bei Bedarf die Eintragung ändern.

Weil der Esperanto-Kalender in aliaflanko.de „inter-aktiv“ ist, ein echter Mitmach-Kalender, ist er unentbehrlich geworden für alle, die wissen wollen, was in der deutschen Esperanto-Szene los ist.

Alois Eder

TEJO-volontulo

... serĉata por labori ekde decembro dum 8 ĝis 18 monatoj en la Centra Oficejo en Rotterdamo. Skribu al oficejo@tejo.org kaj kopie al estraro@tejo.org.

FAME-premio al Kajto

(red) La 24an de oktobro FAME-fondaĵo transdonis en la urbodomo de Aalen la naŭan fojon sian kulturpremion, kiu konsistas el 3.000 EUR kaj estas aljuĝata ĉiun duan jaron. Ĉi-jare la premiito estis la konata muzik-grupo Kajto, kiu ekde 18 jaroj jam agas kiel muzikantaj heroldoj por Esperanto.

Laŭdprelegis la kantisto Ralph Glomp, kiu konfesis, ke la KDoj de Kajto donacis al li multajn belajn horojn. Ĉefurbestro Ulrich Pfeifle, Andreas Emmerich, prezidanto de Germana Esperanto-Asocio, kaj d-ro Werner Bormann, estro de la FAME-fondaĵo, kontribuis per salutvortoj.

Fine la muzik-grupo mem prezentis provon de sia talento kaj entuziasmigis la aperintan publikon. La loka gazeto Schwäbische Post raportis la alian tagon sur sia titolpaĝo tre pozitive kaj atento-veke.

Sekve de „centra artikolo“, kiun Germana Esperanto-Asocio dissendis, Franz Josef Braun sukcesis, aperigi plian artikolon je la 6a de novembro en Badisches Tageblatt, Bühl.

Ne invitu tro senĝene ...

... Esperanto-amikojn el foraj landoj, se la financado ne estas tute klara, avertas la estraro de Germana Esperanto-Asocio (GEA). En la kazo de K.L. privatulo invitis lin post lia aserto, ke li mem povos pagi la flugon. Alveninte en Germanujo la invitito tamen konfesis, ke li nur prunteprenis la monon kaj devos hejme repagi ĝin. Fine aliaj samideanoj kaj GEA vole-nevole devis pagi la mankantan sumon. Estonte la invitinto respondecos sola.



Internacia Esperanto-Simpozio en Vieno

(lepa) De la 8a ĝis la 9a de oktobro en Vieno okazis Internacia Esperanto-Simpozio kun la temo „Esperanto en uragano de la ideologioj“ dediĉita al la 75jariĝo de la Internacia Esperanto-Muzeo (IEM), kiu ekde 1929 estas parto de Aŭstria Nacia Biblioteko, kaj al 100jariĝo de la naskiĝo de Lidia Zamenhof (1904 - 1942).

La Simpozion organizis Aŭstria Nacia Biblioteko kunlabore kun Universala Esperanto-Asocio (UEA). Komence de la simpozio okazis kelkaj prelegoj en la Germana lingvo por la ĝenerala publiko. En la dua parto de la simpozio en Esperanto prelegis prof. Humphrey Tonkin (Usono), mag. Herbert Mayer (Aŭstrujo), d-ro Detlev Blanke (Germanujo), Wera Blanke (Germanujo), Claude Piron (Svislando), Zlatko Tisljar (Slovenujo), prof. Heiner Eichner (Aŭstrujo), Vilmos Benczik (Hungarujo) kaj Ed Borsboom (Nederlando). Vendrede vespere estis aranĝita speciala omaĝo al Lidia Zamenhof.

Antaŭ la Simpozio jaŭde (la 7an de oktobro) vespere en IEM estis malfermita ekspozicio „La danĝera lingvo. Persekutado de Esperanto sub Hitler kaj Stalin“. Dum ĝi parolis la ĝenerala direktoro de la Nacia Biblioteko, d-rino Johanna Rachinger, prof. Heiner Eichner

kaj la direktoro de la Esperanto-Muzeo, mag. Herbert Mayer.

Vendrede kaj sabate en la Aŭstria Nacia Biblioteko okazis ankaŭ akompana aranĝo, nome Internacia Esperanto-kurso laŭ la rekta metodo, kiun gvidis Atilio Orellana Rojas.

La Simpozion kaj akompanajn aranĝojn partoprenis 40 Esperantistoj el Aŭstrujo, Ĉeĥujo, Danujo, Francujo, Germanujo, Italujo, Israelo, Hungarujo, Litovujo, Luksemburgio, Nederlando, Slovakujo, Slovenujo, Svislando, Usono k.a. landoj. Litovan Esperanto-Asociacion reprezentis ĝia prezidanto Povilas Jegorovas, kiu estas ankaŭ la prezidanto de la Loka Kongresa Komitato por la 90a Universala Kongreso. Ĉiujn aranĝojn partoprenis la vicprezidanto de UEA, s-ino Claude Nourmont.

Laŭ informoj de IEM

La Aŭstra ŝtatprezidento legis Esperante

(lepa) Dum la Agotago, la 2an de oktobro, okazis samtage en Aŭstrujo la unua Malfermita Pordo de la nova ŝtata prezidanto d-ro Heinz Fischer en la Kortega Kastelo de Vieno. Elisabeth Hlauschek, vicsekretariino de Aŭstria Fervojista Esperanto-Federacio, kaj la redaktisto de Aŭstria Fervojisto/Bulteno, Leopold Patek, eluzis la okazon, transdoni al la prezidento ekzempleron de la revuo Esperanto, n-ro 7-8, en kiu sur paĝo 164 troviĝas foto de li kun noto de Walter Klag.

La prezidento dankis kaj spontane laŭtleĝis la noton, kiun aŭdis ankaŭ la aliaj vizitantoj. Hazarde ĝuste en tiu momento filmis skipo de Austra Radio Televido (ORF) la scenon, sed en la vesperaj TV-jurnaloj ne elsendis ĝin.

Aldona rimarkigo de la redaktisto: Cetere lia patro, d-ro Rudolf Fischer, estis Esperantisto kaj dum multaj jaroj membroj en diversaj Esperanto-organizaĵoj.

La Longa Nokto de la Muzeoj

(lepa) Post la simpozio okazis en tuta Aŭstrujo la „Longa Nokto de la Muzeoj“, en kiu partoprenis ankaŭ la Internacia Esperanto-Muzeo (IEM).

1.025 personoj vizitis IEM, kompare kun la plej alloga muzeo, nome la Naturhistoria Muzeo kun 9.100 vizitantoj, tiu nombro estas grandioza sukceso por IEM.

Du tagojn poste oni povis vidi en la televida serio „Seitenblicke“ (flankenrigardoj) dum mallonga tempo s-ron Borsboom, instruante vizitantojn laŭ la Cseh-metodo en plenplena ĉambro de IEM.

„Estas mirinde, kiom pozitive rilatas la publiko al Esperanto“

(El rekta raporto, kiun „Esperanto *aktuell*“ ĉerpis la 9an de oktobro el la Interreto.)

Estas la „Longa Nokto de la Muzeoj“ - kompreneble ni partoprenas, Atilio Rojas tre bele gvidas preskaŭ ĉiun duonhoran kurson. [...] Post prezento de Atilio mi ne plu povas reiri al la Muzea salono, ĉar estas tiom da homoj en la kursejo, sed mi devas atendi en la buroo. Mi ĵus telefonis kun mia kolego Christian, kiu sidas ĉe la enirpordo. Kun li estas la sinjorino de ORF, kiu per speciala ilo kalkulas la enirantojn. En la nuna momento, do je la 22h25, estas 662 personoj. Ni ofertis senkoste al la

vizitantoj la faman „Ratespaß“, sed tuj ni devis decidi postuli 1 eŭron por iom prokrasti la elĉerpiĝon de la 100 ekzempleroj. Estas mirinde, kiom pozitive rilatas la publiko al Esperanto.

Do, chi-jare ni pasis la limon de 1000 personoj, kiuj vizitis la Esperantomuzeon ene de ses horoj. [...]

1.025 vizitantoj! Bonan nokton!

El la Esperantomuzeo de la Aŭstria Nacia Biblioteko, **Herbert Mayer**



Aŭstrujo

Nova privata poŝtmarko

En serio de Esperanto-temaj t.n. „personalisierte“ (al persono rilatigitaj) poŝtmarkoj (vd. „*Esperanto aktuell*“ 4/04, p. 1) aperis en Aŭstrujo la tria ekzemplero. Unua eldonto estis la 31a de oktobro. En Aŭstrujo oni povas mendi (kaj pagi!) „siajn personajn poŝtmarkojn“. Ili validas kiel afranko por ordinara letero, kompreneble nur en Aŭstrujo. La nova eldono montras terglobon kun supera skribaĵo „www.esperanto“.

Walter Klag

Malto

Renkontiĝoj kun episkopoj

La Komitato de la Malta Esperanto-Societo renkontiĝis kun la ĉefepiskopo de Malto, d-ro Guzeppi Mercieca, marde la 12an de oktobro 2004, kaj kun la episkopo de la najbara insulo Gozo, d-ro Nikol Cauchi, vendrede la 15an de oktobro.. Dum la renkontiĝoj la komitato donacis al ili jenajn tri librojn: „*Esperanto, the New Latin for the Church*“ de Ulrich Matthias; „*The Life of Zamenhof*“ de Marjorie Boulton, ambaŭ Angla-lingve verkitajn; kaj „*La Sankta Biblio*“ en Esperanto. Ili multe ĝojis pri la donacoj kaj montris grandan intereson pri la progreso de la lingvo en la mondo, precipe rilate religian etoson. Ĉiu renkontiĝo daŭris ĉirkaŭ 30 minutojn.

La foto montras la renkontiĝon de la Komitato kun la ĉefepiskopo de Malto, d-ro Guzeppi Mercieca (meze).

John Vella-Bondin ✉ johnvb@maltanet.net

Francujo

Reklamo en *Le Monde*

Tutpaĝa anonco kiel tiu en DIE ZEIT (vidu „*Esperanto aktuell*“ 1/04, p. 1) aperis dimanĉe, la 26an de septembro, ankaŭ en la prestiĝa Franca ĵurnalo *Le Monde*. La bela paĝo estas titolita „Parlez-vous européen?“. Denove temas pri grandanima donaco de la Japana industriisto Etsuo Miyoshi.

Italujo

Nova dulingva vortaro

Ĝus aperis granda „Dizionario Esperanto-Italiano/Italiano-Esperanto“ kun 24.000 resp. 17.000 vortoj, krome frazeologia parto kun 240 frazoj. Gratulon al la aŭtoro d-ro Umberto Broccatelli.

Brazilo

MusicExpress en Esperanto

La unika kaj reputacia Brazila retejo MusicExpress aperas nun ankaŭ en Esperanto. La retejo donas informojn pri muziko (ne nur Esperant-lingva) kaj estas vizitata de 300.000 vizitantoj monate. Novaj muzikaĵoj kaj novaj altkvalitaj artistoj konstante aldonataj garantias, ke MusicExpress estos tiel bona en Esperanto kiel ĝi jam delonge estas en la Portugala.

<www.musicexpress.com.br/eo>

Laŭ informo de Flávio Fonseca

Ĉinujo

Nova Turisma Servo

Esperanto-parolantaj turistoj, kiuj vizitas Ĉinujon, povas ĝui novan servon de la turisma fako de El Popola Ĉinio. Oni povas rezervi hotelojn kaj flugbiletojn, krome aranĝi ekskursojn. La servo ankaŭ volonte kunlaboras kun aliaj turismaj entreprenoj en la mondo.

Turisma Fakto de El Popola Ĉinio, P.O. Kesto 77, CN-100037 Beijing, Ĉinujo
☎ 86-10-68995937 📠 86-10-68321808

Vi povas ankaŭ turni vin rekte al la direktoro

Wang Ruixiang ✉ wrxzj@163.net



Pakistano

Mia bela hejmlando

El Pakistano skribas **Muhammad Usman Mardanvi** entuziasme pri la naturaj belaĵoj de sia hejmlando:

„Pakistano estas lando de diversaj ĉarmoj, sed malmultaj homoj scias pri ĝi. Ĉi tie estas 125 altegaj pintoj de la mondo, kvin el ili estas pli ol 8000 metrojn kaj la aliaj estas super 7000 metrojn altaj. Ĉi tie estas belegaj lagoj en diversaj partoj de Pakistano, la monde plej larĝa glaciejo estas situata en Pakistano, kie turistoj fremdaj vizitadas vidi ĝin ĉiujare... per mallongaj vortoj: estas multaj da plaĉoj kaj ĉarmoj por diversaj turistoj. Se vi bezonas ian informon, bonvole skribu aŭ retmesaĝu min. Mi laboras ĉi-tie en

turisma kompanio kiel serĉgvidanto por turistoj.“

vere via muhammad usman mardanvi
poŝta adreso: Gaznavi Kolony by Pass road Mardan, N.W.F.P. (Pakistano)

✉ mardanvi2001@yahoo.com

Nederlando

Nova vortaro aperis

(ret-info) Ankaŭ la Nederlanda Esperanto-movado ĝoje salutis novan, 576-paĝan vortaron Nederlands-Esperanto-Nederlands de **Petro De Smedt**. Ĝi enhavas pli ol 44.000 vortojn, 12.000 parolturnojn, 900 proverbojn en la parto Nederlanda-Esperanta, kaj 17.000 vortojn, 2.500 parolturnojn kaj 450 proverbojn en la parto Esperanta-Nederlanda.